

ESPERANTO

★ TRIUMFANTA ★

N-ro 33, 22. Majo 1921

Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

* Eliras semajne. *

La Pentekosto Esperantista.

Ĝis fermo de la redaktado de tiu ĉi numero atingis nin nur mallongaj sciigoj pri la kongresoj en Harrogate, Orléans, Liège kaj Essen.

En Harrogate interrenkontis ĉ. 500 delegitoj por la Brita Esp. Kongreso. Dum la kunvenoj geknaboj kantis kaj ludis kaj la instruistino s-ino Briggs ricevis oran medalon. D-ro Pollen parolis pri „Esperanto en la Oriento“ kaj laŭlegis leteron de Aga Khan. Tri esp. deservoj okazis, unu el ili en la kunveno de la „Amikoj“. Granda nombro de esperantistoj vizitis la kunvenon de Ligo de Nacioj en la Teozofa Halo. Ankaŭ okazis interparoloj de esp. laboristoj.

En Orléans kunvenis ĉ. 100 samideanoj, inter ili kelkaj rusoj kaj japanoj. Venonta kongresurbo estis elektata Béziers.

Dum la Deka Kongreso de Belgaj Esperantistoj en Liège alvenis telegramo sciiganta, ke Lia Princa Moŝto Leopoldo de Belgio akceptis la honoran prezidantecon de la Belga Ligo Esperantista.

La germana kongreso en Essen estis iom malbone influita de la politikaj cirkonstancoj, kiuj nur en lasta semajno klarigis. Tamen ĝi estis granda sukceso por la esp. movado en Germanio, ĉar ĝi estis la unua postmilita kongreso de la germanaj esperantistoj kaj klarigis gravajn demandojn. Kiel venontan kongresurbon oni elektis Bielefeld. Okazis ankaŭ kunsidoj de la katolikoj, de instruistoj kaj de UEA.

Esperable ni povos pli detale raportoj pri la pentekostaj kongresoj en niaj venontaj numeroj.

Esp. Orientfranca Federacio.

La Federacio estas fondita dum konsistiga kongreso la 24-an de aprilo nunjara en Strasburgo. El la oficiala protokolo, kiu per preciza indiko de la adreso atingis nin malfrue, ni ĉerpas jenan raporton:

La kunveno estis malfermata je 11 h. matene. Reprezentataj estis la esp. grupoj de Metz, Mulhouse kaj Strasburgo. La fondiganta grupo Verdun informis letere pri sia aliĝo.

S-ro Pérez, prez. de la grupo Strasburg, klarigis la kialojn, kiuj igis la strasburgan grupon iniciati la konsulton de la Federacio, kaj alprenigis organizan fundamenton, laŭ kiu la Federacio, kies sidejo troviĝas ĉe unu el la konsistigaj grupoj, konsistas el reprezentantoj de l' diversaj grupoj. Tiu reprezentantaro restas en la urbo, kie la Federacio havas sian sidejon. Ili interrilatas ĉefe de firma kunigo kun la grupo, kiun ĝi reprezentas kaj en kies nomo ili rajtas agi.

Esperanto kaj Framasonismo.

La celo de tiu ĉi artikolo estas klarigi la rilatojn inter du grandaj universalaj movadoj: la movado Esperanta kaj la movado Framasona.

Estas neeble klarigi tiun interrilaton kaj similecon, se vi ne scias, kio estas Framasonismo, ĝia celo kaj deveno. Malgraŭ la temo estas tre vasta, mi klopodas skizi ĝin en kelkaj linioj.

Inter la grandaj universalaj movadoj, kiuj estas ofte malĝuste komprenataj pro la fakto, ke oni ne sufiĉe konas ilin, estas sendube la framasonio. Kio ĝi estas, kaj kio estas ĝia celo kaj deveno?

Jam en la malnova Testamento ni trovadis sekton, kiu multege similas la framasonion de la nuna tempo kaj kies kulturoj kaj doktrinoj estis samaj, nome la *Esenanoj*. Ankaŭ la „misterioj“ de Egiptio, Haldeujo, Perseo, Grekio ktp. estis antaŭaj formoj de framasonio, kion pravas historio kaj la arĥeologiaj esploroj.

Longtempe la movado ŝajne dormis, ĝis la mezepoko, kiam en la 14-a jarcento la masonistoj, kiuj konstruis la belegajn katedralojn en Anglujo, decidis revivigi ĝin alprenante la ceremoniojn kaj simbolojn de la vera masonado kaj tiujn de la templokavaliroj.

La vorto *framasono* signifas: „libera masonisto“ (Freimaurer, franc-maçon, freemason, libera muratore, vrijmetselaar).

La framasonio, kaj tiu estis tre grava, ne estas, kiel multaj kredas, kontraŭreligia, sed staras inter

Poste oni pritraktis la fondon de federacia bulleto. Havante mil abonantojn, oni aperigos ĝin.

S-ro Meistermann el Metz faris proponojn rilate al la propagando ĉe la publiko. Li pretendas, ke estu kreataj multaj kursoj en la franca kaj germana lingvoj, ke la federacioj vigle interkorespondu kaj ke en la grupoj oni uzu nur Esperanton. Se oni eldonos bulletojn, oni eldonu ĝin en sufiĉe granda formo por impresi la publikon.

Fine, la kunveno alprenis provizoran statuton pri la konsistito de la Federacio.

Je 1.30 h. posttagm. la laborkunsido estis fermata, kaj sekvis festeno organizita de la strasburga grupo por honoro al la invititajn delegitojn.

Adreso de la prezidanto de la strasburga grupo: Hubert Pérez, 19, Gläubitzweg, Strasbourg-Neuhof.

Kvina Konkursfesto de la Federacio Esperantista de Lancashire kaj Cheshire.

La floraj ludoj unue komenciataj ĉe la Barcelona Kongreso Internacia de Esperanto inspiris en la jaro 1915 kelkajn gvidantojn de la Federacio al simila agado por kuraĝigi la komencantojn al literatura agemo. De tiam, la konkursfesto esperantista fariĝis regula instiucio en nia Federacio.

La 30-an de aprilo la 5-a konkursfesto okazis en Manchester kaj sendube sukcesis pli ol oni atendis dum la nuna malfacila kaj haosplena tempo.

114 partoprenis en la diversaj konkursoj, el kiuj 100 estis gejunuloj inter la aĝo de 12 kaj 14. Plej multe el tiuj venis el la lernejo de Eccles, fama tra la mondo kiel pionira taglernejo rilate al esp. instruo al infanoj. 425 gejunuloj nun instruigas en Esperanto, kaj la lernejestro s-ro Sanderson diris al mi, ke la infanoj korespondas kun alilandaj junuloj de preskaŭ ĉiuj anguloj de la mondo kaj ĉerapas multe da profito de la esp. instruo en multaj direktoj. Unu 14-jara knabino eĉ verkis originalan teatraĵon, kiu laŭ la opinio de la juĝistoj meritis laŭdon. La aliaj konkursoj estis: fe-rakontoj, kantoj, deklamoj kaj senpreparitaj tradukoj.

Multaj alturbaj esperantistoj ĉeestis kaj ĝuis la diversajn samtagajn konkursojn, kiel ekzemple la deklamon el Hamleto „Ĉu esti aŭ ne esti?“ kaj la kantojn por knaboj kaj knabinoj.

Tiaj konkursoj sendube elvokas intereson por la esperanta literaturo, instigas al la komencantoj provi siajn literaturcajn fortojn kaj estas tre rekomendindaj.

La komitato tuj decidis komenci la organizon de la proksima konkursfesto, kiu verŝajne okazos en decembro ĉi-jare. Plena programo kun detaloj aperos post nelonge.

la diversaj religioj, lasante al ĉiu membro lian kredon kaj ne devigante lin sekvi aliajn doktrinojn. Ĝia fundamento do estas plena toleremo, konsciante ke la homoj individue estas egalaj, sed uzas diversajn rimedojn por evoluigi siajn spiritojn. Ĝia celo estas la tutmonda frateco sur la bazo de egaleco kaj libereco.

La simboliko, kiun ĝi transprenis ĉefe de la katedralkonstruistoj, okupas sin je la *konstruado de la Templo de la Homaro*. La vorto *masonado* en tiu ĉi organizo nun fariĝas por vi pli klara. La framasono laboras je tiu Templo, pli kaj pli ĝin perfektigante. Lia unua laboro estas la laboro je si mem. Lia devas ĉirkaŭhaki kaj poluri sian karakteron, por ke li povu okupi la konvenan lokon en la Granda Plano. Li laboras por la bono de la homaro, kaj fial la tasko de la framasono estas tre ampleksa; ĉiu afero, ĉiu problemoj, kiu interesas la homan vivadon, ĉiu materio, ĉu spirite, ankaŭ interesas la framasonon.

La vorto *masonado* ankaŭ montras, ke la laboro estas farata *laŭ plano*, donita de lu pli Alta, kiel ajn oni nomas Tiun, ĉu Naturo, ĉu Alta Spirito, ĉu Dio personigita aŭ ne. Framasono tiu kompreno esprimiĝas en la nomo: *Arkitekto de l' Universo*.

La Plano de l' Arkitekto naskiĝas en ĉiu homo, kiu celas la bonon de l' homaro kaj deziras kunlabori al ĝia nobligo; ĝi estas la „Voĉo interna“, kiu instigas la homon agi en harmonio kun la universalaj ordo kaj leĝoj.

Tial troviĝas tre multaj personoj, kiuj, ne estante membro de la framasona ordeno, tamen estas

Esperanta

Ekspozicio dum la Pariza Foiro.

La Komitato de la pariza foiro, tre favora al Esperanto, senpage disponigis du kioskojn por esp. ekspozicio: kiosko n-ro 728, Avenue de la Motte-Picquet 5, kaj n-ro 378, strato de Meblarto. La organizinto estas s-ro Rousseau, sekretario de S. F. p. E. kaj prezidinto de la ĝenerala sindikato de francaj apotekistoj. La unua kiosko estas direktata de f-ino Gérard, la dua de s-ro Herlement. Multe da propagandiloj estas disdonataj kaj multe da libroj vendita. Multaj trapasantaj samideanoj kaj interesigantoj vizitas la kioskojn.

Esperanto en Komercaj Lernejoj de Paris.

Konforme al la rezolucio alprenita de la komerca ĉambro de Paris, oficialaj kursoj pri Esperanto komencis jam en „La supera praktika lernejo de komerco kaj industrio“ kaj en „La komerca lernejo de la maldekstra bordo“ (la Seine dividita Parizon je du partoj), ambaŭ gvidataj de prof. Cari, kaj en „La komerca lernejo de la dekstra bordo“, de s-ro Pablos, prof. de hispana lingvo en la sama lernejo, malnova revekiginta samideano.

Mondjunularo Katolika (MOKA).

Moka nun laboras deponi 6 monatojn kun granda sukceso. Ĝi nun havas en 15 landoj oficialajn reprezentantojn (delegitojn) kiuj ĉiumaniere klopodas, disvastigi la Moka-ideon por unuigi la tutmondan katolikan gejunularon per Esperanto. En 6 landoj Moka jam havas lokajn grupojn kaj diversaj grandaj katolikaj junulaj societoj aliĝis. Pli ol 100 taggazetoj de 10 landoj enhavis artikolojn kaj noticojn pri Moka. Informojn ktp. donas volonte la ĝenerala sekretario s-ro Hanns Sappl, Graz (Stiro), Karmeliterplatz 5.

Al niaj legantoj.

Pro kvintaga foresto de la redaktoro al la Deka Kongreso de Germanaj Esperantistoj en Essen la nuna numero de ET malfruiĝis je kelkaj fagoj. Ankaŭ la venonta numero suzopeble malfruiĝos pro teknikaj ŝanĝoj en la presejo (muntado de nova presmaŝino). Certe tio estas malagrablaĵo, kiun ni tre bedaŭras; tiam pli ĝoila estas la sciigo, ke en estonteco ni povas garantiĝi tute precizan aperadon kaj deponi julio regulan pliampleksigon de la jurnalo.

framasonoj *sen tabliero*. Ankaŭ ili kunlaboras je la Templo de la Homaro, sed sen la speciala sistemo, kiun donas la organizo por siaj simboliko, ceremoniaro, frataj interrilatoj ktp.

La framasonio posedas tri gradojn, kiuj simbolas ŝtupojn de evolucio: lernanto, kunulo kaj majstro.

La praktikado de la framasonaj principoj postulas oferojn, se necese eĉ memoferon, ĉar la framasono ne laboras por propra profito, nek por glorigo.

El tio, kion mi diris, pruviĝas, ke la framasono devas esti gvidanto de la homaro kaj ke do lia loko estas en la fronto de la kulturportantoj. Multaj grandaj homoj en diversaj jarcentoj estis framasonoj, i. a. Goethe kaj Mozart, kiu lasta en sia opero „La sorĉa fluto“ gloris la framasonion.

Deponi la jaro 1717 la framasonio pli kaj pli disvastiĝis, kaj nuntempe ĝi havas loĝitojn en preskaŭ ĉiuj landoj. Lande la loĝioj estas organizitaj en „Grand-Loĝioj“ kaj „Grand-Orientoj“. Internacie ekzistas oficejo en Neuchâtel (Svisujo) por la diverslandaj Grand-Loĝioj. La Oficiala Bulleto, eldonata de tiu oficejo en angla, germana kaj franca lingvoj, nun ankaŭ enhavas Esperantan parton, dank' al la laboro de la Universala Framasona Ligo (Esperantista).

Ĝis la jaro 1882 nur viroj estis akceptataj. Nun ankaŭ la virino okupas lokon inter la framasonoj, pro la fondiĝo (en 1893) de la *Ordre Maçonnique Mixte International*, „Le Droit Humain“, kiu samtempe estas la unua framasona korporacio, kiu estas plene internacia.

Sciigoj pri Foiroj de Padova (Italio).

Internacia Specimena Foiro en Padova ne estas konsiderota kiel improvizaĵo, sed kiel renoviĝo kaj daŭrigo de tre antikva kaj grava urba Instituto.

Jam dum 1257 Foiro de Padova, foiro dediĉita al Sankta Antonio, ĝuis oficialan rekonon en la legaro de libera Urbo Padova.

Zorgis kaj pligrandigis ĝin tiea Magistrataro kaj precipe Senato de Venezia'a Respubliko; plej sukcese ĝi brilis, en propraj konstruaĵoj, pripensitaj kaj efektivitaj de A. Memmo, dum 1775, kaj ĉiam vigla daŭris ĝia viva forto ĝis nun.

Kaŭzo de ĉi tiu vigla jarcenta vivo elserĉinda estas la feliĉega geografia lokiĝo de urbo Padova, kiu, tra densega vojaro, kiu ligas ĝin kun transalpaj landoj, naskis naturan centrejon de negocoj, kie ĉiujare ĉiulandaj komercistoj (precipe el Levanto pere de haveno de Venezia) efektivigis reciprokajn ŝanĝojn de komercaĵoj.

Alligon de l' antikva Foiro de S. Antonio en nuntempa formo de Specimena Foiro jam estis elpensinta antaŭ la mondmilito ĉi tiea Komerca Cambro, sed la eŭropa tragedio prokrastis la plenumadon de tiu kuraĝa iniciato. Nur tuj post finiĝo de l' mondmilito okazis Unua Internacia Foiro de Specimenoj en Italio, en nia urbo, kies sukceso estis kiel eble plej ĝojiga.

Tiu sukceso, esperplena por la estonto, instigis kaj allogis la fojrestleron daŭrigi ĉiujare la foiron mem, kaj starigi ne provizoran Estanton, kiu efektivigis sub la nomo „SOCIETA ANONIMA FIERA CAMPIONI E MAGAZZINI GENERALI“ (Anonima Societo pri Specimena Foiro kaj ĝeneralaj Magazenoj) kun kapitalo de kvar milionoj da it. liroj.

Dua Internacia Specimena Foiro, okazinta dum la periodo 1.—15. junio 1920, klarigis per siaj rezultatoj (1025 ekspoziciaĵoj, inter kiuj 115 ali-landaj, negocoj je 400 milionoj da liroj), ke la programo de la novnaskita Estado estis entuziasme akceptata ĉe industriaj kaj komercaj rondoj.

La kreado de daŭra Estado donis tiel al la apartaj oficejoj de nia foiro vastan kaj fruktodonan organizadon; naskiĝis veraj observoj de komerca vivo, nome oficejoj de senpaga informado kaj propagando, por ĉiam daŭrigi bonfarajn efikojn de ĉiujara foiro; tiamaniere nun ĝiaj komercaj rilatoj plimultiĝis senmezure kaj nia entreprenado estas certa por la estonto pri tre nombra kaj sindonema klientaro.

Okaze de Ill-a Foiro, (1.—15. junio 1921) estos inaŭguraciaĵaj novaj daŭraj konstruaĵoj el cemento en propra areo da 160 000 m², en kiuj troviĝas ejoj plej diversaj laŭ tipo kaj areo.

Rimarkinda estas la fakto, ke vizitantoj povas iri tra tuta kvartalo sub haloj kaj kovritaj trajoj, kaj ekspoziciaĵoj elmontras siajn specimenojn kun sama sendanĝereco kiel en siaj propraj butikoj.

Propaganda servo por la aliĝoj kaj por la vizito jam estas tute racie organizita en ĉiuj landoj en la mondo, sed la estraro, pensinte, ke tia propagando estas farinda en ĉiu lando laŭ al ĝi plej taŭga maniero, estonte plj kaj pli disvolvigis ĝin.

Tiun ĉi propagandon celas landaj oficialaj kaj ĉie propagandaj delegitoj: ĉiujn estras Centra Oficejo en Padova.

De Centra Oficejo dependas fakaj oficejoj: gastado, vojaĝoj, transportoj, dogano, asekurado, higieno, ktp.

Alligformularoj kaj informpresajoj estas haveblaj en ses lingvoj: itala, angla, franca, germana, hispana kaj esperanta.

Registaroj kaj publikaj estadoj donis faciligojn pri plej diversaj servoj. Itala Registaro aludas

eniron de la specimenoj en Italion per simpla dokumento de provizora importo tute senpage, kaj alligon de tiu ĉi en definitivajn por la specimenoj, kiuj rezultos esti vendataj en la foiro mem.

Stata fervejstraro donas rabaton de 40—60% laŭ la distanco, je la prezoj de transporto por la specimenoj kaj je vojaĝbiletoj por la vizitantoj, de la itala landlimo ĝis Padova.

Italaj konsuloj eksterlande donas ĉiuj necesajn faciligojn al komercistoj pri vizo al pasportoj ktp.; doganaferoj estos traktataj en la foiro anstataŭ ĉe la landlimoj.

Samideanoj el malgrandaj nacioj!

„La malgrandaj nacioj estas la ĉefaj interesatoj en problemoj de internacia lingvo.“ prave skribis sinjoro Privat.

Sed, kio okazas? Ni filoj de malgrandaj nacioj senicite atendas kiel decidis la angloj, francoj kaj germanoj. Sed ili ne bezonas internacian lingvon tiel urĝe kiel ni.

Samideanoj! Ofte oni aŭdas riproĉon, ke la grandaj nacioj, kiuj havas en siaj landoj la plej gravajn entreprenojn esperantistajn, ne sufiĉe propagandas Esperanton. Ho, kiajn miraklojn vi ankoraŭ atendas de grandaj nacioj? Vi konsideru pri la decidemo de la Pariza Komerca Cambro! Ne forgesu, ke la propagandisto de Esperanto ĉe potencaj nacioj estas ofte nomata perfidulo de patrujo.

Ĉu ni volas ankoraŭ iniciate agi en la demando de internacia lingvo? Aŭ ĉu nia ĝejnularo en lernejoj precipe komercaj kaj specialaj eterne staros embarasite antaŭ la multlingveco, tasko, kiu estas ekster la kapabloj de studentoj?

Samideanoj! Dum la Praha Kongreso oni intencas organizi kunvenon de samideanoj el malgrandaj aŭ politikaj ne gvidantaj nacioj! Venu tien vi albanoj, araboj, armenoj, bulgarioj, ĥinoj, danoj, estonoj, finnoj, grekoj, ĥindoj, hungaroj, kimroj, kroatoj, letonoj, litovoj, luĵicaj serboj, poloj, portugaloj, rumanoj, serboj kaj turkoj! Aŭ sendu al la subskribinto ĝustatempe viajn raportojn kaj proponojn.

Ni volas koni la statojn de nia forto kaj labori. Pripensu kaj sciigu min, kiamaniere vi intencas influ vian registaron aŭ delegiton en Ligo de Nacioj, ke ili estu favoraj al Esperanto.

Ĉu vi povas en via nacio atendi helpon de sciencistoj, politikistoj, ĵurnalistoj kaj verkistoj? De kiuj? Sciigu la adresojn!

Sendu ilian opinionon pri Esperanto! Kia estas ĉe vi la situacio de modernaj vivantaj lingvoj? Kiu estas la preferata lingvo? Kiaj estas ĝiaj sukcesoj en lernejoj?

Kion vi opinias pri la artikolo de samideano J. Maĉernis en „Esperanto“, novembro 1920, paĝo 204?

Sendu viajn proponojn, raportojn aŭ sciigojn al mi! Represu ĉi tiun alvokon en naciaj gazetoj. Venu al Praha!

Rudolf Fridrich,
profesoro ĉe gimnazio
BRNO-KRALOVO POLE
Ĉeĥoslovakio.

Al la vizitantoj de la Dektria.

La esperantistaj asocioj en Aŭstrujo sentas la agrablan devon akceli la plenan sukceson de l' solena festo de la tutmonda samideanaro kiu en ĉi tiu jaro estas aranĝata en la ĉefurbo de la najbara Bohemujo.

Wien mem, urbo la plej granda en Mezeŭropo, aranĝos nek antaŭ- nek posikongreson, por ke aliaj

Ĉiu neframasono scias, ke la triangulo estas framasona simbolo. Ĝia signifo nun klare montriĝas: se la du malsupraĵaj anguloj signifas tezo kaj antitezo, oni jam povas diveni la signifon de la angulo supra: La framasono serĉas tion, kio povas unuigi, kaj klopodas forigi, kio disigas. Li do levigas kun tiuj du tezoj supren, alie super la antaŭjuĝoj, kaj ili renkontiĝas en la supra pinto de la triangulo: la sintezo: la unuigo. Unuigi estas lia deziro, „detruai la murojn inter la popoloj (kaj inter la homoj) dividitaj“.

Ankaŭ en Esperanto: Pri naciaj lingvoj kaj apartaĵoj, ni, esperantistoj, ne disputas. Oni povas esti naciema ne forgesante, ke trans la limoj loĝas niaj similuloj. Naciaj lingvoj ne efikas por la interrilatoj, kaj tial la esperantistoj levigas kun tiuj lingvoj supren, kaj ili renkontiĝas en la supra pinto de la triangulo: Esperanto, kiu estas la vera sintezo de ĉiuj lingvoj. Tiun sintezon trovis nia neforgesibla Majstro kaj la tuta homaro pro tio ŝuldas al li grandan dankon. Kiel bone, ni framasonoj, povas kunigi kun li en lia „Espero“ kaj „Preĝo sub la Verda Standardo“ kaj en liaj kongresparoladoj, kiuj spiras vere framasonan senton.

Dum la I-a Kongreso de Esperanto, kelkaj esperantistaj framasonoj, kiuj spertis la konfuzon por la lingvodiversaĵo en propraj kunvenoj, kunigis kaj fondis la societon „Esperanto-Framasona“, kun celo disvasti Esperanton inter la framasonaro. Tiu ĉi societo ĉiam kunvenis dum la Esperanta Kongreso. Precipe la kunveno en Antverpeno estis tre sukcesplena. Dum la IX-a Kongreso en Bern oni transformis la societon en ligan,

jam projektataj samspecaj aranĝoj per tio ne estu malhelpataj. Multaj esperantistoj certe jam nun decidis veturi al Budapeŝt, Graz, Dresden aŭ aliloken. Sed estas sendube, ke multaj samideanoj, veturontaj el malproksimaj landoj al la kongreso en Praha, deziras tiukaze viziti ankaŭ la vidindan kaj gastaman ĉefurbon de Aŭstrujo: la historie faman kaj nun tiel ofte — bedaŭre kun kompto — nomatan Wien—Vieno. Multaj kongresanoj eĉ devige travojaĝos kaj nepre restados ĉi tie.

La esperantistaro en Wien—Vieno estas tute konscia pri la devo, kiu koncernas la prizorgon por la bonvenontaj gastoj. Ĝi preparos ĉion, por bone akcepti ilin kaj kiel eble plej agrablige ilian restadon en la urbo „apud la blua Danubo“, kuŝanta en belega ĉirkaŭaĵo kaj posedanta tiom da antikvaj belartaĵoj.

Precipe la tagoj antaŭ la Universala Kongreso, la 28. k. 29. de julio, kaj la tagoj post ĝi, la 6.—10. de aŭgusto, estos la plej taŭgaj por tiaj vizitoj. La fremdlandaj samideanoj estas do korege invitataj aranĝi sian antaŭ- aŭ postkongresan vojaĝon tiamaniere, ke ili povu restadi dum tiuj tagoj en Wien.

Kiu volas viziti nian belan hejmlandon estas petata, anonci la tagon (ev. horon) de sia alveno kiel eble plej frue, por ke la akcepta komitato povu ĝustatempe zorgi pri enloĝigo. — La certeco, ke ĉiu samideano estos ankaŭ en Wien kore kaj kontentige akceptata, povus akceli la decidon viziti la Dektrian en Praha.

Estas ankaŭ projektata komuna veturado el Wien al Praha, eventuale ankaŭ el Praha al Wien. Dum la tagoj de alveno de gastoj estos ankaŭ en ĉiuj Wien-aj stacidomoj akcepta komitato kaj en la centro de la urbo akceptejoj kaj informejo.

Samideanoj, dezirantaj viziti Wien, bonvolu tuj sciigi pri tio la subskribitan estron de la komitato.

Ĉiuj sin anoncintoj poste ricevos apartan ĉirkuleron kun pluaĵ detalaj informoj.

Ĝis revido en Wien!

Por la akcepta komitato de la Esperanto-Delegitaro de Wien:
Hugo Steinhauer,
Wien, II, Böcklinstr. 8.

Esperanto en la milito.

Alvoko al ĉiuj esperantistoj.

La plej bona adapteco de Esperanto estas pruvoj de ĝiaj adapteco kaj utileco en la vivo. La pasinta milito donis al ni en tiu ĉi direkto multon da ekzemploj.

Tra la sukata atmosfero de homa malamo, tra la bruo de framortigaj krioj ne unu fojon aperis antaŭ la militintoj Esperanto kun sia milda vizaĝo kaj ne unu fojon sendoloriĝis la kruelajn vundojn de malfeliĉaj batalintoj.

La rememorigo de tiuj ĉi belaj momentoj estos plej bona pruvo, ke Esperanto malgraŭ tre malfavoraj kondiĉoj plenumis sian grandegan desinion rilate la homaron. Sed por ke faktoj parolu por si mem, ili devas esti orde kolektitaj. Dezirante preni sur min la ordigon de tiuj faktoj, mi petas ĉiujn esperantistojn, kiuj povas liveri al mi iajn ajn sciigojn koncerne tiun ĉi temon, sendi ilin sub mia adreso (Varsovio, str. Marszałkowska 125). La faktoj devas esti priskribitaj kun ĉiuj eblaj detaloj, povantaj pruvi ilian aŭtentikecon.

Mi esperas, ke neniu esperantisto rifuzos doni al mi la necesajn posedatajn de li sciigojn, kiuj por nia komuna afero havos gravegan valoron.

D-ro Leono Zamenhof.

Rim. de Red.: Opinante, ke la propono de nia ŝatata samideano estas sufiĉe grava, ni forte subtenas ĝin kaj petas niajn kolegojn kaj kunfratojn repressi la alvokon.

nomatan „Universala Framasona-Ligo“, kiu tuj komencis sian agadon per solena tempokunveno. En 1914 la unua loĝio, laborataro per Esperanto, estis fondata en Parizo.

Pro la mondmilito la Ligo ne povis funkcii, sed antaŭ la XII-a Universala Kongreso de Esperanto en Hago kelkaj membroj decidis revivigi ĝin dum tiu kongreso. Tiel fariĝis. La estraro de la Ligo havas nun sian sidejon en Nederlando. Malgraŭ la mallonga tempo, kiu pasis post la XII-a Kongreso, la Ligo jam povas noti sukceson: baldaŭ fondiĝos sekcio en Leipzig. En Leipzig, Bath (Anglujo) kaj Amsterdam, Esperanto estas vigle propaganda kaj kelkaj kursoj estas organizitaj. En kelkaj aliaj lokoj oni klopodas restarigi la movadon. Rilatoj estas serĉataj kun franc-, ital- kaj hispanlingvaj landoj, kie antaŭe regis vigla fervoro por nia afero.

Denove ni kunvenos dum la XIII-a Kongreso en Praha. Eble pligrandnombra la kunveno estos ĉeestata pro la favora valuto. Tiu kongreso fariĝu sukceso por Esperanto inter framasonoj! Jam nun komencu viajn agadojn! Estas ankoraŭ sufiĉe da tempo por organizi kursojn, por ke la kursanoj povu partopreni la XIII-an Kongreson. Tiam ni pli kaj pli proksimiĝos al la celo: La oficiala akcepto de Esperanto por la internaciaj rilatoj en la framasonoj!

Pri Universala Framasona Ligo (Esperantista) oni sin turnu al s-ro C. Barthel, Wöhlerstrasse 14, Frankfurt a. M.

Serena

La plej maljuna Esperantisto.

Pastro John Anderson, Corstorphine apud Edinburgo, estas la plej maljuna esperantisto en la mondo. Li naskiĝis la 10-an de majo 1821, do nun estas centjarulo. Post edukigo en Doller kaj la Universitato de Edinburgo, li iris al Kalkuto, kiel misisto de la Eklezio de Skotlando. Post dek jaroj de sukcesa laboro en Hindujo, li revenis al Skotlando kaj fariĝis paroĥa pastro unue en Dalkeith kaj poste en Culter. En 1891, en sia sepdekaj jaro, li eksciĝis kaj sin refiris de aktiva pastreco. Tamen li okupis sin per modernaj studadoj, kaj malgraŭ siaj multaj jaroj, li retenis vigran junan spiriton. Inter aliaj aferoj li lernis Esperanton, kaj kvankam pro sia granda aĝo li ne povis aktive labori por nia afero, li multe interesiĝis pri ĝi.

La 10-an de majo, la 100-an datrevenon de lia naskiĝo, vizitis lin s-ro J. M. Warden, prezidanto de Brita Esperantista Asocio, kaj pastro W. Ross, prezidanto de Skota Federacio Esperantista, kaj transdonis al li korajn salutojn de la samideanoj. Li esprimis la plezuron, kiun li spertis en la studado de Esperanto, kaj rigardinte sian centjaran vivadon, li dankis al Dio por Esperanto, ĉar ĝi helpis renovigi lian junecon (Psalmo 103.5). Li forte kredas je ĝia utileco al la homaro, ĉar ĝi plene kapablas esprimi ĉiujn ideojn de la homa penso. Kun intereso li aŭdis pri la ĵusaj sukcesoj de Esperanto ĉe la Komercambro en Parizo kaj ĉe la Ruĝa Kruco; kaj, petite doni komunikon al la samideanoj, li diris: "Ne laciĝu pri nia afero; persistu, ĝis la homoj tra la tuta mondo povos paroli nian veran, vivantan, praktikalan lingvon, ĉiu al la aliaj, viziĝon al vizaĝo."

Pastro Anderson esperas legi la libron "Vivo de Zamenhof", kiun oni donacis al li, kiel naskotagan donacon.

W. M. P.

Kroniko.

TICINO (Svis). Ĉiusemajne niaj ĉiutagaj gazetoj aperigas favorajn artikolojn pri Esperanto. Sekve de la aliĝo de la Komercambro de Locarno al movado por universala komerca lingvo diversaj firmoj de Locarno aliĝis aŭ aliĝos al UEA. La Oficejo por Fremduloj (Ufficio Informazione Locarno) eldonos esp. gvidlibron, se ĝi vidos grandan nombron da mendoj. Mendu do al Ufficio Informazione Locarno (Svislando) esp. gvidlibron.

La loka esp. grupo fervore laboras. Dimanĉon la 29. de majo okazos ĵara promenado al Pallanza (Italio).

S-ino G. Mattei Alberti, instruistino de Osogna, estas elektita kantona delegito de IKA.

Sporto.

Post senlacaj klopodoj de nia agema samideano s-ro De Masi, delegito de Universala Sport-Ligo por Italio (Lungarno Gambacorti 23, Pisa), la malnova sportista societo G. Gerbi de Pisa kunfundiĝis al la Esperanta Grupo de Pisa. Por forte disvastiĝi Esperanton en la sportistaj rondoj inter la membroj de la esp. grupo reorganizigis sportista sekcio sub la nomo de Esperantista Sport-Grupo (Giuseppe Gerbi).

La sportistaj esperantistoj de Pisa deziras, ke en ĉiu grava urbo estu fondotaj sportistaj grupoj aŭ sekcioj ĉe la lokaj esp. grupoj.

Sportistoj!

Mi petas ĉiun sportiston, kiu partoprenos la XIII-an en Praha, ke li tuj anoncu al mi sian adreson por ke Universala Sport-Ligo povu prizorgi ĉion necesan por la Universala Sport-Liga Kunveno. Jen la tagordo de nia faka kunveno:

- Raporto pri U. S. L.;
- Teknika sport-vortaro;
- Regularo de U. S. L.;
- Sport-revuo;
- Diversaĵoj.

Universala Sport-Ligo.

La sekretario:

Stef. Pedrazzini, Locarno (Svislando).

Esp. gazetoj estas petataj represii nian alvokon.

Universala Sport-Ligo

celas plimultiĝi kaj plifaciligi rilatojn inter ĉiutandaj sportistoj, krei sportistan literaturon, servi kiel peranto en la internaciaj rilatoj de sportaj organizaĵoj, diskonigi kaj disvastiĝi la uzadon de la internacia helpilingvo Esperanto ĉe la sportistaj rondoj. U. S. L. serĉas reprezentantojn en ĉiuj landoj kaj en ĉiuj urboj. U. S. L. jam havas naciajn konsulojn en sekvantaj landoj:

Italio: s-ro De Masi, Lungarno Gambacorti 23, Pisa;

Franco: f-ino Roksan, av. G. Clemenceau, Beziers (Hérault);

Jugoslavio: s-ro Alfonz Bertoli, Prilaz Baruna Filipovića 6, Zagreb;

Germanio: s-ro d-ro Robert Theilhaber, Rechtsanwal, Neuhauserstr. 29, München;

Polujo: s-ro Cz. Pruski, str. 5 go Maja 28, Siedlce;

Nederlando: s-ro H. Th. Greidanus, Zoet Singel 44 A, Leiden;

Japanujo: s-ro Tomio Ogata, studento ĉe la Dai San Kotogakki, Kioto;

Hungario: s-ro Paulo Rado, IX Radaj u. 8, Budapest;

Hispanujo: s-ro Jozefo Meseguer, 7 Recaredo, Barcelona;

Ĉeĥoslovakio: s-ro Pavel Filovsky, Stramberk, Moravio;

Sud-Italio: s-ro G. Amelio, Via Scuole 54, Potenza;

Svisujo: s-ro Stef. Pedrazzini, Locarno.

Aliĝu senpere ĉe la sekretario s-ro Stef. Pedrazzini, Locarno (Svislando).

Universala Framasona Ligo (Esperantista).

La jarkunveno de suprenomita ligo okazos la 2-an de aŭgusto en Praha dum la XIII-a Universala Kongreso de Esperanto. Tiu ĉi kunveno havos grandan signifon por la propagando de Esperanto inter la framasonoj ĉiutandaj. Ĉiuj framasonoj vizitontaj la kongreson estas invitataj ĉeesti ĉi tiun kunvenon.

Provizora tagordo: 1. Malfermo. 2. Raporto Sekretario—Kasisto. 3. Propagandaj rimedoj. 4. Aliĝo al "Fédération Maçonnique".

Ĉiuj samideanoj framasonaj estas petataj se eble hali en Frankfurt a. M., kie okazos antaŭkonferenco. Oni sin turnu al s-ro C. Baribel, Wöhlerstrasse 14, Frankfurt a. M. La 30-an kura vojaĝo al Praha.

Diskonigu ĉi tiun alvokon en la framasona gazetaro de via lando.

La estraro.

Kelkaj membroj de la „Universala Ko-Framasonio“

(Ordre Maçonnique Mixte Internationale „Le Droit Humain“) aranĝos publikan kunvenon dum la XIII-a Kongreso de Esperanto en Praha.

Temoj: 1. Kio estas Framasonio? 2. La virino en la Framasonio. 3. La Ordeno de Universala Ko-Framasonio.

Interesuloj estas invitataj ĉeesti ĉi tiun kunvenon, kies temoj estas gravaj por la nuntempo. La paroladoj estos tute en Esperanto.

Samspeca kunveno okazos en Frankfurt a. M. la 29-an de julio. Paroladoj en Esperanto kun germanlingva traduko. Broŝuro „Kio estas Universala Ko-Framasonio“ baldaŭ aperos kaj estos disdonata al la vizitantoj de ĉi-supraj kunvenoj.

La aranĝantoj.

Blinduloj.

Ĉiu blindulo, ĉu lernante ĉi propagandante Esperanton, ĉiujfoje spertis dolore, kia plena manko je Esp. literaturo regas en la porblindulaj bibliotekoj, tute ne parolante pri fiurilata manko en privataj libroj de blindaj esperantistoj. La Esp. legomaterialo de blinduloj konsistas nur el la ĉi-monata „unu“ numero de nia punktipesa gazeto. Mi do petas ĉiujn vidantajn samideanojn, kiuj havas tempon, emon kaj precipe la kapablon, transskribi Brajlan librojn por la blinduloj, helpi tiamaniere al nia movado ĝenerale kaj al la bedaŭrindaj homoj speciale.

Ĉiujn pluajn informojn kaj konsilojn donas ĉiam tre volonte

Ignaz Krieger,
Wien VII, Zieglergasse 25.

Tra la Mondo.

Lloyd George akre kritikis en parolado la agojn de la poloj en Supra Silezio. Pro tio en Polio regas granda ekscito.

La komitato por la restarigoj akceptis la germanan noton pri pago de 150 milionoj da ormarkoj. 140 mil. estas pagotaj per eksterlandaj devizoj, 10 mil. per ĉekoj.

Angla laborministerio registras por la unua semajno de 1 majo 1920 300 senlaborulojn kaj krome 1095999 personojn kun mallongigitaj labortempo. Fine pro striko ne laboras 1200000 ministroj.

Laŭ informoj el Helsinko, la kontraŭbolŝevika armeo de generalo Jelow, konsistanta el 40000 viroj, okupas la urbon Omsk post longaj akraj bataloj.

Parolejo.

(En la lastaj semajnoj alvenis multaj „paroloj“ ĉe la redakcio, pli ol 80 pri diversaj temoj kaj ĉ. 20 rilatantaj al parolo 68 pri formato kaj literoj de ET. Kvankam pri lasta temo la opinioj estas tre kontraŭaj, tamen la granda plimulto konsentas, ke la formato devas aŭ resti aŭ pli-grandiĝi por havi la aspekton de vera tagurnalo, precipe ĉar ĝi nun estas en multaj urboj publike vendata per staciaj libroj, kioskoj ktp. Ne povante publikigi ĉiujn, ni represos en la venonta numero, se iel eble, almenaŭ la plej rimarkindajn. — La paroloj pri aliaj temoj aperos iom post iom; kelkaj jam ne estas aktuala, kelkaj nur vidigas malkomprenon, sed aliaj estas tiam pli publikigindaj. Ni petas la sendintojn pri senkuligado, ke ni ne povas tuj represii ĉiujn parolojn kaj opiniojn.)

81.

(Rilatas al 67.)

Vere la formoj kiel „kolorilo, kuracilo“ komence malplaĉas, ĉar estas demando pri fluitaĵoj. Tamen oni povas analizi: Kolorilo ne rilatas al verba formo kolori en senco kolorigi, sed en la senco esti de la koloro. Kolorilo do efektive estas helpa rimedo por esigi koloron, kiu la mem estas nur fenomeno, ne materio. Kaj por kolorigi per kolorilo ni uzas kolorigilon, t. e. ekz. penikon. Koloraĵo povas ankaŭ esti la aĵo kolora. Cetere oni ĉiam povas aludi al la saĝaj konsiloj de nia Majstro, ke la praktikaj sankcioj ankaŭ esprimojn malpli plaĉajn kaj ke la absoluta logikeco ne estas ĉiam la plej facila. Sed kiel ne uzi onstataŭ kolorilo la jam enkondukintaj farboj, koloroj?

82.
(Rilatas al la artikolo „Politiko en la Esp. Gazetaro“ en ET n-ro 81.)

Est. redaktoro!
Leginte vian artikolon ni ne volas preterlasi la okazon por aldoni kelkajn vortojn. Vi estas tute prava skribante, ke ni evitu la politikon en niaj esp. gazetoj. Se oni skribas esperante, oni ĉiam devas pripensi, ke oni trovas sur neŭtrala bazo kaj kiel eble plej multe devas penadi eviti ĉion, kio povus ofendi iun nacianon. Ni antaŭvidis, ke la Letero el Polio kaŭzos inter la germanaj legantoj malkontenton kaj koleron. Tute komprenebla! En Esperanto ni restu neŭtrala!

Ni rimarkis kun miro, ke samideano loganta en Polio skribas pri la Suprasilezia problemo. Tiamaniere oni estonte ne aranĝu la Internacian Esp. Servon. En tia kazo ĝi ne plu estas Internacia Esp. Servo, sed nur kolekto de diversaj personaj opinioj. Kiel ni ekzemple, loĝante en Opperl, povus skribi pri la Saar-teritorio, aŭ kio okazas en Berlino aŭ Parizo! Do — laŭ nia opinio ĉiu nur skribu pri tiu lando, en kiu li loĝas, ĉar alie kriegaŭ nur mal-veraĵoj. Ni ne plu volas nun detale preparoli la Leteron el Polio, — havus nenian sencen; sed ni petas, ke estonte ĉiu skribu nur pri sia koncerna lando aŭ regiono. Estas ja ankaŭ komprenebla, ke nur tiu, kiu propraokule vidas kaj proprareale aŭdas, povas doni plej klarajn informojn. Ĉiuj naciaj gazetoj skribas plimale pli intence malveraĵojn, almenaŭ la esp. gazetoj restu objektivaj.

Ni povus multe raportii pri Supra Silezio, sed ni tuj decidis ne skribi por ET leterojn pri tiu lando. Ni bone scias, ke ni baldaŭ havus malamikoj same la polojn kiel la germanojn, se ni skribus objektive la puran veron. Tial ni preferas silenti.

Ni esperas, ke nia amiko en Polio kaj vi, est. redaktoro ne koleros pro niaj malkaŝaj opinioj, kaj salutas plej sincere.

Fratoj Felke, Oppeln,
Supra Silezio.

Recenzejo.

LIBRO.

AMO PER PROVERBOJ. Unuakta komedio de Arthur Azevedo. El portugala lingvo tradukis A. Couto Fernandes, LK-ano kaj prez. de Brazilia Ligo Esperantista. Eldonejo Oskar Zieger & K-jo, Markt-Redwitz (Germ., Bavario) 16 pg. 11:15 cm. Prezo 3 resp.-kup.

Kompletio de la prezento. La aŭtoro estis nur 15-jara, verkanie ĝin. La traduko estas bona, parte modela. Kelkaj neĝustaj: ne ĉiuj veroj devas esti diritaj (anst. dirataj); lasu min tiel (pli bone fia). Preseraro: ĉu oni povas diri (anst. diri). — La komedietoj mi povas rekomendi al ĉiu esp. grupo. (R-ano.)

GAZETO.

ESPERANTO. Majo. Detala raporto pri la X-a Konferenco de la Ruĝa Kruco en Genève (30. marto ĝis 7. aprilo), dum kiu estis alprenata rezolucio por Esperanto. Multaj aliaj legindaj. Preskau 4000 anoj pagis sian nunjaran kotizon al UEA.

ESPERO KATOLIKA. Majo. La riĉenhava organo de la kat. esperantistoj. Enhavas interalie la provizoran programon de la Universala Kongreso por la Tiumonda Katolikaro (10—14. aŭgusto 1921 en Graz).

GERMANA ESPERANTISTO. Majo. La nuntempo plej bone redaktata el ĉiuj naciaj esp. propagandaj gazetoj. 28-paĝa.

HISPANA ESPERANTISTO. Aprilo. Kun bele ilustrita artikolo pri Praha, kaj aliaj legindaj.

LA ESPERO. Aprilo-majo. Kun raporto pri la jarkunveno de Sveda Esp. Federacio en Falun, Nekrologo kun portreto pri f-ino Finholdt.

LA VERDA OMBRO. Marto. 4-paĝa folieto presita.

LE MONDE ESPERANTISTE. Marto-aprilo. En francalingva artikolo „Phobie des Langues“ estas priiraktita rezolucio de la komerca ĉambro de Oran, tute kontraŭa al tiu de la komerca ĉambro de Parizo, koncerne la internacian lingvon.

VERDA UTOPIO. Marto. Kun portreto kaj poemo de d-ro Ramsiedt, finna ambasadoro en Tokio, konata esperantisto.

EUGENIA. Barcelona. Majo. Kultura revuo katalunlingva favoranta Esperanton.

MESSZEITUNG (Foirgazeto) Frankfurt a. M. 14. majo. Artikoloj pri „Werkbund“. Teknika Revuo. La ekonomia situacio, ktp. Ekonomia perspektivo (esp. komercistoj) uzu la servon de tiu ĉi rubriko, oferante al la esperantemaj firmoj el tiu indikitaj viajn komercaĵojn.

Filatelistoj! Novaĵo!

Ĝus aperintaj konstituciaj polaj poŝtmarkoj, belega eldono, same 30 diversaj antikvaj maloftaj poŝtmark-kompletoj da diversspecaj polaj; same ukrainaj, Detlura, rusaj jubileaj Romanoff, de generalo Judentić, kontraŭ-batalano de Bolŝevikoj, rusaj sovjetaj, kaj aperintaj poŝtmarkoj de Litva Srod-kova, de generalo Zelgovskij. Ankaŭ malnovaj moneroj. Liverado al seriozaj pograndaj filatelistoj. La pago per respond-kuponoj, bankbiletoj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj.

Adolfo Oberrotman, Varsovio,

Krak-Prz. 10.

Korespondo kaj Interŝango.

S-ano Willy Kupper, Düsseldorf 113, Germ., Ektratherstr. 94, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn. Kiu sendas al mi poŝtmarkojn de sia lando, ricevas la saman kvanton da germanaj.

S-ro Herbert Miksch, Düsseldorf, Germ., Ackersstr. 79, 17-jara lernanto, deziras korespondi per ilustr. poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj.

S-ro Willy Herschbach, Düsseldorf, Germ., Martinsstr. 22, deziras korespondi kun samideanoj en la tuta mondo.

S-ano Willy Hilgers, Düsseldorf-Eller, Germ., Gertrudisplatz 21, interŝanĝas poŝtmarkojn ilustr. kun samideanoj el ĉiuj landoj.

S-ro Eduard Volkmann, Düsseldorf, Germ., Uerdingerstr. 77, deziras interŝanĝi ilustr. poŝtmarkojn kaj poŝtmarkojn; tuj respondas.

S-ro Theodor Meisen, Düsseldorf, Germ., Ellerstr. 155, deziras korespondi kun ĉiutandaj samideanoj.

S-ro Wilhelm Preiss, Düsseldorf, Germ., Friesenstr. 79, deziras korespondi per ilustr. poŝtmarkoj; ĉiam respondos.

S-ano Paul Münten, Düsseldorf, Germ., Fürstenwall 119, kiu sendas al mi 40—50 poŝtmarkojn de sia lando, ricevos 60 poŝtmarkojn de mia lando.

S-ro Mathias Mathiesen, Düsseldorf, Germ., Elisabethstr. 79, deziras korespondi kun samideanoj ĉiutandaj; ĉiam respondos.

Anoncetoj.

(Familiaj anoncetoj senpage. Aliaj kostas por dufoja enpresado la samon kiel kvin numeroj de ET. La monon ni deprenas de la konto de la abonantoj. Kvinfoja enpresado kostas la duoblon.)

MASINSEGILO KAJ LOKOMOBILO. Mi serĉas aĉeti de germana maŝinfabrike unu maŝinseglon (gateron) malpezan kun 12 segiloj (lasta modela) kune kun unu vapormaŝino (lokomobilo), ankaŭ malpeza, 16 ĉevalfortoj. Posedantoj sin turnu al Hrisio D. Sabev, seĝo Siolac-Sevlevsko, Bulgario.

LIBROJ. Sendu al mi almenaŭ 50-100 nedifektajn uzitajn poŝmarkojn de via lando, kaj mi sendos interŝange bonajn esp. librojn. Aŭ sendu vian adreson, kaj mi sendos definitivajn proponojn. — C. Goldsmith, 5, Cheverton Avenue, Witherssea, Yorks, Anglio.

AVIZO: Korespondado Ĵariĝos tro kara! Al miaj multegaj gekorespondantoj en la diversaj landoj mi devas sciigi, ke pro la grandega plialtiĝo de la internaciaj poŝtaj tarifoj mi estas devigata ĉesigi mian interkorespondadon je mia tre profunda bedaŭro. Ankaŭ mi sciligas al la esperantistaj korespondantoj kaj aliaj, ke mi tute ne interŝanĝas poŝmarkojn kaj neniam respondos al tiurilataj proponoj. — Migrantajn kartojn mi ricevas po centoj, kaj estas tute neeble por mi pluŝanĝi ilin. — Se oni sendos al mi respond-kuponon sufiĉan por la respondo, mi tuj kaj akurate respondos. — Björn P. Blöndal, del. de UEA, Hvammstanga, Islando.

AVIZO. PEI (Petrograda Esperanta Informejo) sciigas al ĉiuj samideanoj, ke ĝi senpage komunikadas diversajn informojn pri esp. movado en Rusio, Siberio kaj Ukrainio, adresojn de ĉiuj esp. organizaĵoj en nomitaj landoj ktp. PEI interŝanĝas per esp. eldonaĵoj kaj deziras korespondi kun eksterlandaj esp. organizaĵoj per poŝkarto. Leterojn oni sendu laŭ jena adreso: Aleksandro Pilev, Petrogrado, Fontanka 17 (administranto de PEI).

DOMETOIN (ingojn) de vivantaj surlandaj kaj endolokvaj MOLUSKOJ (limakoj kaj konkoj) el ĉiuj landoj deziras ricevi (interŝange je iuj ajn dezirataj objektoj al esperantoj) zoologiisto d-ro R. Wohlstadt, 22, Lübeckertierhof, Hamburg (Germ.), Mineralogia-Geologia Instituto.

PRAGAĴANOJ! Kiu el vi povas akcepti senpage nur por la kongres-semajno esp. junulon, kiu tre deziras ĉeesti la kongreson, sed pro malbona materiala situacio ne povas efektivigi sian deziron. Sin turnu al J. Lejzerowicz, Lodz, Polujo, 28, Kilinskiego.

TIROLO. Esperantista familio (geedzoj kun dekdud-jara filo), kiu volas pasiĝi la lernejan liberecon, depost komenco ĝis fino de aŭgusto, en Tirolo, tre volonte restadas inter gesamideanoj. (Gesinjoroj), kiuj havas la saman deziron, bonvolu turni sin al la subskribinto. Gesamideanoj, kiuj povas rekomendi fian pensionejon aŭ hotelon je moderaj prezoj, estas petataj pro tio. — Max Rother, del. UEA, Krefeld (Germ.), Königsstr. 129.

Korespondo kaj Interŝango.

(Dufoja enpresado kostas la samon kiel tri numeroj de ET. La monon ni deprenas de la konto de la abonantoj. Kvinfoja enpresado kostas la duoblon.)

Robert I. Clegg, 225 North Michigan Avenue, Chicago, Illinois, Usono, Ameriko, deziras korespondi kun ĉiulandaj framasoj, ne framasojn.

Mi volas korespondadi per ilustr. kolor. poŝkarto. — Clarence L. Thomas, 2854 N. Taylor Str., Philadelphia, Pa., Usono, Ameriko.

H. Haenen-administristo de l' minlernejo, Heerlen (Hol.), deziras interŝangi poŝmarkojn kun superslezianoj, rusoj, polojanoj, ĉeĥoslovakianoj, finnoj kaj ekster-eŭropanoj.

Izaak Spiro, Białystok, Pol., Poŝtekesto 61, deziras korespondi kun gelernantoj, ankaŭ vendi kaj interŝangi poŝmarkojn, papermonojn kaj monbiletojn.

Kiu deziras aĉeti malkare poŝmarkojn de „Flume“, Jugoslavio, Litovio kaj Polio, aŭ interŝangi poŝmarkojn kaj papermonon, bonvolu skribi al s-ro L. Galinski, Sobieskiego 5, Białystok, Polio.

Kiu bezonas bonajn polajn poŝmarkojn kaj papermonojn, tiu povas interŝangi poŝmarkojn kaj papermonon kun mi. Mi korespondas ankaŭ pri matematiko kaj naturscienco. — Lazaro Grosberg, Białystok (Pol.), ul. Jurowiecka 5.

S-ro d-ro August Sochacki, del. UEA, Denblin (Polio), deziras korespondadi per poŝkarto ilustritaj pri kuracistaĵoj kaj humanaj temoj; nepre akurate respondos.

S-ro J. Szpink, Warszawa (Polio), Miła str. 20/22, deziras interŝangi kartojn ilustr., poŝmarkojn ktp. kun tiufandaj esperantistoj; ĉiam respondos.

S-ro Izaak Ajer, Białystok (Polio) skryznka poct. 55, interŝanĝas papermonon, sendas laŭvole belajn polajn poŝmarkojn kontraŭ papermonoj; nepre kaj tuj respondos. Aleksandro Pilev, Rusio, Petrogrado, Fontanka 17, deziras korespondi kun esperantistinoj de Finnlando, Francio kaj Anglio, per poŝkarto ilustritaj (bil.); tuj respondas. Anna Pileva, Rusio, Ukrainio, Zmieiv (= urbo), Uprdokom, deziras korespondi kun gesamideanoj el ĉiuj landoj.

Omsk, Siberio, strato Novaja 18, Klubo Esperantista, s-ro Anufrijo Gordejev, deziras korespondi kun samideanoj el ĉiuj landoj, precipe kun fraŭlinoj, pri diversaj temoj.

S-ro Stefano Bakongi, Budapeŝt IV, Szép u. 5, Hungario, deziras korespondadi per poŝkarto ilustritaj kun ĉiuj landoj.

S-ro Julio Dicker, Miskolcz, Hung., Tetemvár 12, deziras korespondi per poŝkarto ilustritaj kun ĉiuj landoj kaj per leteroj, precipe kun librovendistoj.

S-ro Julio Krámer, Miskolcz, Hungario, Szechenyi utca 87, sz., deziras korespondi per ilustr. poŝkarto, poŝmarkoj kaj leteroj kun ĉiuj landoj.

S-ro Aleksandro Weisz, Miskolcz, Hungario, Zsolczai-kapu 5, sz., deziras korespondi per poŝkarto ilustritaj, poŝmarkoj, gazetoj kaj leteroj kun ĉiuj landoj.

Mi vendas hungarajn poŝmarkojn, multe pli malkare ol katalog-prezoj. — Kolomano Wiesinger, Budapeŝt VII, Wessélnyi str. 30.

Aüg. Cermak, profesoro en Lísti nad Orlicí. Ĉeĥoslovakio, deziras interŝangi poŝkartojn kaj leterojn kun fremdlandaj samideanoj ĉiam respondos.

Jiri Frankenberg, del. UEA, Bytča u Ziliny, Slovakio, interŝanĝas poŝkartojn kaj leterojn kun turistoj de la tuta mondo.

S-ro J. Oulehla, adm. oficisto en Skřivany apud Novy Bydzov (Bohemio) deziras interŝangi poŝmarkojn kun Rusio, Ukrainio, Polio, Estonio, Litovio, Letonio, Danio, Islando, ĉiujn germanajn plebiscitajn, Württemberg, de ordinaraĵoj ĝis pli altaj valoroj, po 1 ĝis 10 de ĉiu speco laŭ katalogo Michiel 1920.

F. Curra Basé, 36 Calle Xifré, Barcelona, deziras korespondadon per ilustr. poŝkarto kaj leteroj kun ĉiuj landoj.

D-ro L. Kasper, jugisto en Eibiswald, Sirdio, Aŭstrio, deziras korespondi precipe pri turistaj temoj; li ankaŭ respondos volonte aliajn demandojn ĉiuspecajn; liaj filinoj ankaŭ interŝanĝas poŝmarkojn ordinarejn.

Willy Thieking, Breslau VIII, Vorwerkstr. 62, Germ., deziras opini-interŝanĝon pri ĉiuj kampoj de la botaniko; ankaŭ kolektas kaj interŝanĝas poŝmarkojn.

Fritz Spauke, Breslau II, Brunnenstr. 30, Germ., deziras interŝangi poŝkartojn kun ĉiuj landoj; ĉiuj karto estus responditaj.

3a Internacia Specimena Foiro en Padova (Italio)



1.—15. Junio 1921.

Unua foiro en Italio en neprovizoraj konstruaĵoj (24000 m²) kaj tute kovritaj trairejoj, en propra kvartalo de 160000 m².

Ĉiulandaj komercistoj egalkondiĉe akceptataj.
Ĉiuj industrioj allasataj.



Senpagaj Esperantaj presajoj kaj ĉiuj informoj pri partoprenado, vizitado kaj organizado haveblaj ĉe Ufficio Informazioni della

3-a Fiera Internazionale di Campioni in Padova (Italia).

Internacia Foiro de Breslau

Dua Printempa Foiro samtempe 52. Poragrikultura Maŝinfoiro

2.—5. Junio 1921.

Agrikulturaj maŝinoj kaj iloj; maŝinoj kaj iloj por fiŝkaptado, arbara ekspluato, ĝardenkulturo, birdar-kaj abel-bredado, ĉasado; arifaritaj sterkajoj, semajoj; agrikultur-industriaj instalaĵoj; maŝinkonstruado kaj tekniko; konstrumeto kaj konstrumaterialo; arto kaj arteficio, internaj dekoraciaĵoj; buroajoj; sporto.

Informojn donas

Breslauer Messe-Gesellschaft m. b. H.

ESPERANTO-FAKO

Breslau I, Ohlauerstr. 87.

ARGENTINIO.

Reprezentadon de ĉiuspecaj komercaĵoj, facile vendeblaj en Sudameriko, nur de kapablaj firmoj unuaklasaj, akceptas eksoficisto teknika de la Argentina Terkultura Ministerio. Konatiĝis bonege dum 7 jaroj kun la tieaj ekonomiaj cirkonstancoj. Post kelkmonata restado ĉi tie reveturos Argentinon, trapasonte okcident-kaj nordokcident-eŭropajn landojn. Absolutaj moralaj-materiaj garantiitaj. Adreso ĝis la XIII-a: L. Keley, Szászsebes (Sehesul Sasesc), Transilvanio, Rumanio; poste: Keley-Martelli, c. Caseros 528, Buenos-Aires, Argentino.

Angla kaj Esperanta Etimologio

(Angle kaj Esperante.)

Verkita de Charles G. Stuart-Menieth.
(Oksforda diplomo kun distingo.)

„Utila lernilo por atentigi la anglan publikon pri multaj Esp. radikoj en ilia lingvo.“
Holanda Pioniro.

„Interese kaj tabelo.“ Kristana Espero.
Vidu citojn p. 87 de nova Jar-libro B. E. A.
Prezo 10 pencoj (= 4 respond-kuponoj) afrankite.
B. E. A., 17, Hart Street, London WC 1.



Razaparatoj

por poŝo, el laŭno argentumita, en bela nikelumita ujo, tegita per veluro.



Bruligiloj.

Lasta novaĵo: Bruligilo „Patent-krajono“ n-ro 116, uzebila kiel bruligilo same kiel krajono. Objekto por ĉiutaga uzado. — Seriozaj aĉetantoj mendu nian prezaron. Ni serĉas reprezentantojn.

Muscat & Christlein, Nürnberg, Germ.

Kelkaj membroj de la Esp. Grupo Horrem, Bez. Köln, Germ., deziras korespondadon kun gesamideanoj el ĉiuj landoj. Oni skribu al Esperanto Grupo, Horrem, Bez. Köln, rest. Jungbluth.

Korespondadon per poŝkarto ilustr. aŭ leteroj kun gesamideanoj el ĉiuj landoj, precipe kun fraŭlinoj, deziras s-ro Ludwig Goppel, Horrem, Bez. Köln (Germ.), Luden-dorfstr. 35. Ĉerte respondos.

Korespondadon per poŝkarto ilustr. aŭ leteroj kun gesamideanoj el ĉiuj landoj, precipe kun fraŭlinoj, deziras s-ro Michael Wieland, Horrem, Bez. Köln (Germ.), Waldweg 21. Ĉerte respondos.

Walter Strauss, Höfchensstr. 88, Breslau (Germ.), deziras korespondi kun gesamideanoj en la tuta mondo per ilustraĵoj poŝkarto; respondos tuj.

Prof. Sauerborn, Köln, Siebengebirgs-Allee 32, deziras interŝangi stampitajn kaj nestampitajn poŝmarkojn kontraŭ samnombraj germanaj poŝmarkoj kun samideanoj en ĉiuj landoj.

S-ro Karl Thumm, Vilbel i. H., Germanio, Frankfurterstr. 55, deziras korespondi kun la tuta mondo per il. poŝkarto kaj leteroj.

Herbert Haetzel, Breslau XII, Hermannstr. 27, Germ., deziras interŝanĝon de ilustr. poŝkarto kaj poŝmarkoj el ĉiuj landoj.

Esperanta-Pola Eldonejo NOWE TORY (LA NOVAJ VOJOJ)

fondita de prof. L. Kronenberg en Bydgoszcz, Polio.
(Telegramoj: Tory, Bydgoszcz.)

Vendas kaj interŝanĝas

poŝkartojn el ĉiuj plej vidindaj urboj de Polujo (ĉefurbo Warszawa, fama preĝejo Czenstochowa, salminejo Wieliczka, Krakovo, Leopoldo, Lodzo, montaro Karpatoj ktp.),

poŝmarkojn eksterlandajn kaj polajn, tre maloftajn,

papermonon eksterlandan kaj polan, antikvan monon nikelan, argentan.

Detalaĵojn por respondkuponon.
Ne sendas unua.

Volas aĉeti

pli grandan kvanion da prespapero.

Peras

presadon de broŝuroj en polaj presejoj, malkostaj pro la mona kurzo.

Donas komercajn informojn.

Serĉas interrilatojn kun presejoj, eldonejoj kaj paperejoj.

Aranĝas reklaman en pola gazetaro.

Plena profito por propagando de Esperanto en Polujo.

Kataluna Esperantisto

Oficiala Organo de Kataluna Esperantista Federacio.

Ĉiumonata gazeto, nur esperante redaktata, sur kiu regule aperas bonegaj tradukoj de valoraj verkoj el la kataluna literaturo.

Jarabono: 5 pesetoj.

Redakcio kaj Administracio: Carme, 30, Barcelona.